As it happened, I had a bad cough and could not have joined in, and so was not minded to protest, but no-one else seems to have spoken up. It would have been a good performance for the visiting lady mayor. Since every *Universala Kongreso* has included the song, national congresses should do so as well, to express our being a part of the worldwide movement, as well as continuity with the historical tradition.

If anyone does not wish to join in or listen, they are free to leave the room, but the tradition should be preserved. I hope at any rate to join in 'La Espero' at Llandudno.

Miland Joshi



UEA lanĉis perretan kinejon

Karaj membroj de UEA,

UEA lanĉis novajn servojn en la interreto. Meze de majo aperis la unua numero de *UEA viva*, 10-minuta filmjurnalo kun raportetoj pri aktualaĵoj en UEA, TEJO kaj la Centra Oficejo, pri novaj libroj ktp. Jam aperis du numeroj.

Iom pli frue ekfunkciis reta kinejo, kie eblas jam spekti programerojn de la aprila Malferma Tago de la CO kaj historiajn dokumentojn pri la unua Internacia Junulara Kongreso (IJK) en 1938 kaj pri IJK kaj Universala Kongreso en 1959. Iom post iom oni aldonos aliajn filmojn. *UEA viva* troviĝas en www.youtube.com/UEAviva

La reta kinejo troviĝas en www.ipernity.com/doc/97850/home/video.

La aperitmo de numeroj de *UEA viva* kaj de novaj filmoj en la reta kinejo dependos de ilia populareco. Mi invitas vin regule rigardi ilin kaj diskonigi ilin! Oni povas finance subteni la produktadon de tiuj novaj servoj per donaco al la konto 'video' ĉe UEA. Koran dankon!

Osmo Buller,

Ĝenerala Direktoro de UEA



Japanaj lernantoj serĉas korespondantojn

Karaj samideanoj,

Se vi interesiĝas pri korespondado kun japanoj, bonvolu turni vin al:

Koresponda Servo de Japana Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3, Tôkyô, 162-0043 Japanio.

Skribante al ni korespondopeton, bonvolu aldoni viajn aĝon, sekson, profesion, interesojn kaj viajn preferojn por faciligi nian laboron.

Kun anticipa danko ni kore salutas vin.

N. Sakurai, Tokio, Japanio



Informilo de Ĝemelaj Urboj

Estimataj,

Aperas *Informilo de Ĝemelaj Urboj* per nova formo. Tamen ni plie perfektigos ĝin kiel eble plej kapable. Ni per ĝi konstruas

ponton inter urboj, precipe inter ĝemelaj urboj.

Informilo de Ĝemelaj Urboj aperas en la du retejoj www.internacia-gazeto.com kaj www.aliaflanko.de.

Mi starigos rubrikon 'Urbestro kaj Esperanto' en la informilo, kaj kolektas priajn informojn, ekz. pri partoprenoj kaj paroladoj de urbestroj en ajna Esperanto-arango. Mi kore esperas, ke vi povos prezenti priajn informojn, inkluzive de fotoj.

Diskonigo de *Informilo de Ĝemelaj Urboj* al viaj konatoj estas mia espero, partopreno en la projekto Ĝemelaj Urboj estas mia atendo.

Informu min, se vi volas ricevi la perretan bultenon.

Wu Guojiang

Komisiito de UEA pri la

projekto Ĝemelaj Urboj

Fushun Shiyouyichang

Yanjiusuo,

CN-113008 Fushun Liaoning,

Ĉinio; retadreso:

ghemelurboj@yahoo.com.cn



Ĉina peto por ekspozicio

Karaj amikoj,

Ni estas Tangshan-a Esperanto-Asocio. Hodiaŭ ni skribis leteron al vi por unu peto.

Kurantjaro estas 150-a naskiĝtago de Zamenhof. Por memori tiun tagon, ni aranĝos ekspozicion en la fino de la jaro. Unu el la celoj de la ekspozicio estas elmontri bildkartojn kaj uzitajn kovertojn de diversaj landoj, sed tre bedaŭrinde ni ne havas bildkartojn kaj uzitajn kovertojn de via lando. Ĉu vi povas sendi al ni kelkajn el via lando? Se vi bezonas ion de nia lando, ni povas sendi al vi. Ĉu vi povas helpi nin? Ni atendas vian respondon.

Nia adreso estas:

TEA, Poŝtkesto/Xinxiang 3,

Tangshan, Hebei,

CN-063000 Ĉinio.

• Capital Scots

The website 'The Capital Scot' at <http://thecapitalscot.com> is carrying a succession of six extensive articles on famous Scottish Esperanto literary figures, with photographs: 'The Scottish School', 'William Auld', 'John Dinwoodie', 'John Francis', 'Albert Goodheir' and 'Reto Rossetti'. The material has been sourced mainly from *Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto 1887–2007* by its compiler.

• 'Love in Esperantujo' – video

Under the title 'High hopes for the future of the universal language', Anica and Terry Page tell how Esperanto is not only an international language, it is also 'the language of love'. This excellent little video produced by *Luton News*, followed a press release by Encore PR. It ended with EAB's phone number and web address. Find it via the video link: www.lutontoday.co.uk/video.aspx?VideoPath=LHP/esperantojp%20settings.wmv&VideoID=3408&ArticleID=5160132.

On 30 April *The Citizen of Leighton Buzzard* also published an illustrated interview with Anica and Terry Page, as well as Joyce Bunting. To see both go to: www.bedfordtoday.co.uk/todays-choice/VIDEoesperanto-cel-ebrates-anniversaryof.5160132.jp.



NEW car sticker

Green on white, 20 x 5cm. For £2.00 with other goods, usual p. & p., but on its own £2.30, postage paid from EAB. It is sticky on the front, so ideal for window or windscreen.



• **Strato Esperanto:** En 1983, estante juna advokato kaj esperantisto, Lenio Marobin proponis al la urba konsilantaro de Lajeado, provinco Rio Grande do Sul, Brazilo, nomi straton 'Esperanto' en nova loĝkvartalo tiam planata. La propono estis tuj akceptita. En la sama urbo ekzistas ankaŭ strato 'Zamenhof', sed proponita poste de alia esperantisto. Lenio reiris al 'sia strato' en majo por ĉi tiu foto.

• **Literaturfaka recenzo pola** Numero 5, 2008, de la pollingva priliteratura revuo *Porownania* (Komparoj) publikigis recenzon pri *Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto*, verkitan de Bogusław Bakula, kiu estas la profesoro pri kompara literaturo en Universitato Adam Mickiewicz, Poznań.

• **Esperanta blogo pri iPhone** Aperis kolektiva blogo pri la fama produkto iPhone de Apple. Kelkaj entuziasmuloj, kunordigataj de Aleksander Osincev el Rusio, prezentos al Esperanto-parolanta publiko ĉiujn avantaĝojn de iPhone. Oni planas esperantigi iPhone kiel eble plej plene, kaj pri tio jam aperis ideoj kaj komenciĝis laboro.

iPhone jam iĝis internacia poŝtelefono kun riĉaj funkcioj,

do tute logike estus uzi ankaŭ internacian lingvon por paroli pri iPhone kaj kunlabori internacie por krei ion, kio estos utila por diversaj homoj. Fari tion oni povas nur kune, kaj se vi havas deziron paroli pri via adoraĵo, venu, komentu kaj ĝuu. Vi povas eniri skipon de aŭtoroj aŭ simple skribi fojfoje artikolojn pri tio, kio vin plej interesas. Oni jam konstruis blogon per esperantigita Wordpress. Ĉio grava por komunikado kaj funkciado de blogoservoj ankaŭ jam estas esperantigita, do kunlaboro povas funkcii senĝene.

Por ke nia lingvo estu komprenata, ni kompilis ĝisdatigitan terminaron pri iPhone kaj vortareton kun tiuj terminoj.

Ni pretas enlistigi ankaŭ viajn terminojn, kiuj nun mankas.

Daŭrigo sur paĝo 15

EAB bookshop – selection

• Please add 15% for post and packing – cheques payable to 'EAB'. You may make phone purchases using your debit/credit card: tel. 0845 230 1887. • EAB cannot stock all titles, but can order items, for which you pay EAB in sterling. The UEA catalogue is at <http://katalogo.uea.org>. • Second-hand books are available from librarian Geoffrey King, see www.biblbut.org/html/brokante, and from a seller at louis@samovarbooks.com. • Books marked (B) are designed for beginners.

Afero de Espero Heidi Goes £8.00

Rotterdam: UEA, 2007. 86p. A concise history of the Esperanto movement in Africa.

Beletra Almanako 3 ed. J. Camacho, P. Dasgupta, I. Ertl £9.30

New York: Mondial, 2008. 175p, 21cm, illus. A compilation of original and translated prose, poetry, essays and reviews. Includes prize-winning texts from the 1998 UEA *Belartaj Konkursoj*.

Beletra Almanako 4 *NEW* £9.30

New York: Mondial, 2009. 139p. Original and translated prose, comic strip, essays and reviews.

Conversational Esperanto – Ĉiutaga Esperanto Don Lord £9.00

Barlston: EAB, 2008 (2nd ed.). 228p, 21cm. Collection of short texts, mostly dialogues, written in lively, everyday Esperanto and designed for learners who would like to improve their fluency.

La Danĝera Lingvo Ulrich Lins £14.70

Moscow: Progreso, 1990. 568p, 20cm, HB. Well-documented history of the persecution of the Esperanto movement, particularly under Hitler and Stalin, but also in Tsarist Russia and Japan.

(B) *50 Fabeloj de Ezopo* Kojiro Nakagaki £5.20

Toyonaka-si: JELK, 2004 (new rev. ed.). 87p. Short fables, simply written.

La Hobito J.R.R. Tolkien £15.70


Kaliningrad: Sezonoj, 2005. 224p, illus., PB. Trans. by C. Gledhill (prose) and W. Auld (poems). The amazing fantasy tale from the author of *Lord of the Rings*.

(B) *La Krimo de Katrina: Facila Rakonto* Sten Johansson £2.60

Skövde: Al-fab-et-o, 2001. 36p, 21cm, PB. A simple story for finishers of a basic course who want to extend their knowledge and vocabulary.

Lidia Wendy Hillier Eo trans. by B. Westerhoff from the English original *NEW* £24.50

Antwerp: FEL, 2007. 398p. Authoritative biography of the daughter of L.L. Zamenhof.



Lingvo kaj Vivo Gaston Waringhien £10.90

Rotterdam: UEA, 1989 (2nd rev. ed.). 452p, 21cm. An elegant collection of essays on the sources and structure of Esperanto: one of the mainstays of esperantology.

La Lupino Saki Trans. by Edmund Grimley Evans £8.00

Cambridge: 2005, 154p, 20cm. A collection of satirical short stories, each with a wry twist at the end.

Ne Tiel, sed Tiel Ĉi! Konsilaro pri Stilo F. Faulhaber £2.90

Beauville: SAT-Broŝurservo, 2002 (3rd ed.). 64p. Classic advice on style – how to write beautiful Esperanto prose.

Nova Esperanta Krestomatio William Auld (ed.) £10.90

Rotterdam: UEA, 1991. 510p, 21cm. A vast panorama of texts drawn from the whole history of Esperanto: stories, outstanding translations, scientific and linguistic essays, original poems and an anthology of poetry from 73 languages.


Pocket Esperanto Dictionary Andrew McLinin £13.35

Rotterdam: 2001 (2nd ed.). 414p, 16cm. Two-way dictionary

with more than 70,000 words and expressions.

Vizito sur la Teron István Nemere £5.20

Moscow: Impeto, 2001. 168p, 20cm, PB. Someone or something arrives on earth, spends a few days and leaves; a science fiction story with some fantasy elements featuring many themes.



Baldaŭ aperos novaĵoj pri Esperantaj klavaro kaj programoj. Jen la retadreso de la blogo: <http://iphoneo.info>. (Aleksander Osincev estas juna Moskva lingvisto. Li havas blogon ĉe Ipernity: <http://www.ipernity.com/home/kienli>.)

• **New Butler Library website**
EAB's Butler Library has a new website address: <http://biblbut.wordpress.com>. The old address will work for a while, until the subscription runs out.


• **Virtualaj vojaĝoj de lernantoj**
La 7-an de marto en la Kibercentro (Cybercentre) de La Roche-sur-Yon, Francio, dudeko da membroj de la societo *Espéranto-Vendée* partoprenis unuafoje en eksperimento, kiu konsistis el rilatigo, per aŭdvida tekniko Skajpo (<http://www.skype.com/>), de kursanoj kun Esperanto-parolantoj el Japanio, Ĉinio kaj Brazilo. Tion faciligis la iama interesiĝo pri Esperanto ĉe unu el la respondeculoj de la Kibercentro. Lia helpemo kontribuis al sukceso.

Aperas sur la retejo <http://esperanto-vendee.asso-web.com/>, kun fotoj, raportoj, kiujn redaktis en tri grupoj dek lernantoj partoprenintaj en la eksperimento.

Tiaj eksperimentoj ebligas al ĉiuj lernantoj longegajn virtualajn vojaĝojn kaj kontribuas al ilia konvinko pri la valoro, intereso kaj utilo de Esperanto. La horardiferenco tamen povas starigi problemon.

Tro malfrua kontakto kun anglalingvaj landoj – cele montri, ke Esperanto estas ankaŭ tie uzebla – malebligis organizi plian interŝanĝon.

• **Nova ret-informejo**
Informas Peeter Aitai, ke estas nova reto (kiu en pluraj landoj estas jam tre populara inter junularo), en Britio nomata www.ifame.co.uk. Tio estas nova



• **New novel promotes Esperanto:**
The new utopian novel Forever Pleasure by US aerospace engineer Theodore R. Eastman is an adventure through two Esperanto-speaking futures. The hero is an English-speaking time traveller who discovers two positive utopian futures, both speaking Esperanto. The novel is available from Amazon (ISBN 978-0-595-49909-0).

loko, kie indas doni informojn. Tiucele li jam aliĝis kaj tie malfermis Esperanto-klubon. Vidu sub <http://www.ifame.co.uk/clubs.php?act=show&id=89>. Li petas aliĝon por almeto de pri-Esperantaj informoj anglalingvaj.

• **Invito al Aŭstralio**
La Aŭstralia Esperanto-Somerkursaro 2010 okazos inter la 10-a

kaj 23-a de januaro, ĉe 'International House'. Ĉi tiu domo estas loĝejo de internaciaj studentoj de Universitato de Sidnejo, troviĝas meze de la urbocentro kaj estos ankaŭ la tranoktejo de la kursanaro. Estos kvin kursniveloj, de porinfana ĝis 'stimula'.

Januaro estas bonega tempo por viziti Sidnejon, ĉar tiam okazas tre multe. Estas i.a. plaĝoj, restoracioj kaj sporto, kaj krome en januaro okazas la Festivalo de Sidnejo, kiu dum tri semajnoj proponas riĉan programon, en kiu partoprenas artistoj el tuta Aŭstralio kaj el aliaj landoj.

Legu plu ĉe <http://aesk.esperanto.org.au>, aŭ petu pliajn informojn de: Paul Gorny (Volontulo de la LKK), rete: aesk@dodo.com.au.

• **Kunkonstrui Esperantomonumenton en Herzberg!**
La franca entreprenisto kaj esperantisto Michel Basso volas donaci al 'la Esperanto-urbo' Herzberg am Harz, Germanio, grandan monumenton 'Espero' kun terglobo (el betono). Li kaj ni petas vin bonvole sendi al ni ŝtoneton (kun grandeco inter olivo ĝis kokina ovo) kun priskribo pri la deveno, loko, speco de la ŝtoneto. Oni skribas:

Daŭrigo sur paĝo 18

• **"Esperanto: La freneza veto de Triballat" artikolas**
Le Journal des Entreprises, n-ro 35, marto 2009

Laŭ la franclingva artikolo, Olivier Clanchin, prezidanto de Triballat, volas igi Esperanton lingvo de la komerco. Li nuntempe eksperimentas per projekto kun siaj teamoj.

La estro de la grupo Triballat, en la urbo Noyal-sur-Vilaine, akiris komence de la nuna jaro malgrandan italan entreprenon. Famkonatas pri ĉiuj eksterlandaj kompani-aĉetoj, ke plej malfacile estas harmonie kunlaborigi la homojn de malsamkulturaj organizaĵoj, kaj ĉar la angla ne estas tiel evidenta por la francoj kaj italoj, Clanchin lanĉas 'frenezan defion', ke iuj el liaj dungitoj povos komuniki kun la itala teamo en ... Esperanto.

La bretona industriestro kunlaboras i.a. kun Philippe Bérizzi (Esperanto-parolanto jam de 20 jaroj kaj estro de la tradukagentejo LinguaForce en Rennes) por krei la societon *Entreprise Esperanto*. Temas pri starigi profesion trejnigon per fulminstruo al la bretonaj kaj italaj teamoj, por ke ili lernu 'la universalan profesiecan lingvon'.

Instruo el Nepalo: Sen studi saĝo ne venas

Antaŭ multaj jaroj vivis saĝulo Anomata Vardaj. Li havis filon. Lia nomo estis Javkrit. Ankaŭ li volis saĝuliĝi. Por saĝiĝi necesas edukado kaj studado. Sed li volis iĝi saĝulo sen studado.

Lun tagon li demandis al si: "Kiel saĝiĝi sen studi?" Kaj li tuj trovis respondon: "Mi iros al la bordo de la rivero kaj sidante, meditante mi akiros edukon. Eduko kreskigos saĝon kaj kun saĝo mi fariĝos saĝulo." Ne atentante pri la konsilo de la patro, li foriris al la riverbordo kaj komencis mediti, sidante kun kruroj krucigitaj. Li faris grandan meditadon. Li ne timis ŝtormon, pluvegon, hajlon, ktp. Li daŭrigis la meditadon.

La reĝo de la dioj loĝas en la ĉielo. Dum Javkrit meditis, li aperis apude sur la tero kaj diris: "Ekstaru, kara, kaj malfermu la okulojn!"

Li malfermis la okulojn, ekstaris kaj surpriziĝis vidante apud si la dion de la ĉielo – Indra. Li salutis lin kaj diris: "Kara dio! Mi tre ĝojas vin vidi. Jen plenumiĝis mia deziro." Indra karesis al li la kapon kaj afable demandis: "Diru, kara, kio estas via deziro? Kial vi meditadis tiel multe?"

Preĝante li respondis: "Dio mia! Sen studado, per la forto de meditado mi povos ellerni tutajn Vedojn. Sen ajna laboro mi povu akiri tutan mian saĝon."

Aŭskultante Javkriton, Indra ridis kaj diris: "Kara Javkrit, via deziro estas stranga. Sen studi, kiu povas saĝuliĝi? Vi devas studi por trovi saĝon kaj saĝuliĝi. Legu Vedojn hejme kun via patro, la saĝulo. Edukado ne ekzistas sen instruisto. Elektu kiel instruiston vian patron, aŭ aliajn.

Javkrit diris: "Kara, studado postulas longan tempon. Mi ne volas perdi tiom da tempo. Mi tuj volas saĝuliĝi."

Indra konsilis al li, dirante: "Kara, forĵetu tian obstinon. Sen laboro, sen studado saĝo ne eblas."

Al Javkrit ne plaĉis la ideo de la dio. Li diris al la dio: "Bonvolu foriri. Al mi ne plaĉas via ideo kaj konsilo. Mi volas akiri saĝon sen studi, helpe de meditato."

Javkrit daŭrigis la meditadon. Kun malĝojo Indra foriris kaj alvenis en

ĉielo. Li pensis: "Kiamaniere stulta knabo kiel Javkrit povas esti kondukita sur ĝustan vojon?" Estis lia devo fari ion por tia stulta homo. Baldaŭ venis al li bona ideo, kaj li reiris al Javkrit. Sed ĉi-foje li estis maskita kaj vestita kiel

Brahmao. Li komencis ĵetadi sablon en la akvon de la rivero. La fluo de la rivero forportis la ĵetitan sablon. De tago al tago li faris tion antaŭ la meditanta knabo. Javkrit vidis ĉion kaj trovis lian agadon tre stranga. Finfine li ekstaris, iris al Brahmao kaj demandis: "Sinjoro, kial vi faras tion?" Brahmao respondis: "Ĉu vi ne vidas? Mi volas fari baraĵon ĉi tie." Aŭdinte la respondon de Brahmao, Javkrit ridegis kaj diris: "Stulta

homo, ĉu en tiel granda rivero estiĝos baraĵo el la sablo ĵetita de viaj manoj?"

Brahmao respondis kolera: "Vi volas akiri saĝon sen studi. Se tio eblas, kial mia volo ne ebligas?"

Javkrit ne respondis. Li foriris de Brahmao, kiu daŭrigis sian laboron. Javkrit pensis pri sia provo kaj decidis ne plu mediti. Li iris hejmen, bedaŭris pri sia ideo kaj ekstudis Vedojn kun sia patro.

Cholnath Pokhrel, Nepalo



Klarigoj: hajlo glaciiginta pluvo; obstina malcedema; stulta malsaĝa ŝtormo pluvego kun ventego; Vedoj sanktaj libroj de hinduismo; Brahmao En la hindua diotriopo, la krea eternulo, kiu iniciatas ĉiun ciklon post la malkreo fare de Ŝivo.

• If you would like to subscribe to *Juna Amiko*, send £11 to the EAB office with your name and address, or order online at www.esperanto-gb.org

50 jaroj de JEB – kaj pli

www.jeb.org.uk

Aprilo estis okupita monato por JEB. Inter la 17-a kaj 20-a okazis la Brita Kongreso de Esperanto en Salisbury, kaj proksimume naŭ JEBanoj ĉeestis. Kelkaj grave kontribuis al la programo, ekzemple Andrew Weir, kiu prelegis vendredon vespere pri la temo Asterikso. Por aliaj estis ilia unua brita kongreso, do ili kaptis la okazon ekkoni pli aĝajn membrojn de la brita Esperanto-movado kaj ĝui la novajn spertojn.

Sabaton posttagmeze ni ĉiuj ekscitiĝis, ĉar ni festis 50 jarojn de JEB. Tim kunportis du belegajn kukojn kaj post eta parolado pri la historio de la asocio, ni rajtis manĝi. Feliĉe estis pli da kuko en la ĉambro ol homoj, do eblis preni pli ol unu pecon de la frandaĵo!

Konvinke pri la venonta UK

Post tiu festo okazis unu el la plej aŭskultindaj prelegoj de la semajnfino. La pola junulo Przemek Wierzbowski parolis al ĉiuj pri la venonta Universala Kongreso en sia hejmurbo de Bjalistoko. Li sukcesis tiel bone prezenti kaj la urbon kaj la eventon, ke je la fino mi ege bedaŭris, ke pro laboro mi verŝajne ne povos ĉeesti. Mi tiom bedaŭris, ke mi poste parolis pri tio kun mia estro, kaj li finfine permesis al mi feriumi dum tiu semajno. Almenaŭ kvar JEBanoj vojaĝos al Bjalistoko ĉi-somere.

Somera renkontiĝo de JEB

Dimanĉon okazis la jarkunsido de JEB, kiu kiel kutime estis pli mallonga kaj trankvila ol tiu de EAB. Ni diskutis bezonatajn ŝanĝojn al nia retpaĝaro, niajn novajn flugfoliojn por komencantoj kaj ideojn por estontaj renkontiĝoj. Mi do povas anonci, ke la somera renkontiĝo de JEB



Supre: *La festokukoj.*
Dekstre: *Anoj de JEB babilas sur la herbejo ekster la kongresejo en Salisbury.* Sube: *Prezidanto de EAB, prof. John Wells, inaŭguras la kuktranĉadon por festi la 50-jariĝon de JEB.*



okazos inter la 4-a kaj 5-a de julio en la urbo Felixstowe (Suffolk). Ni intencas alveni sabaton posttagmeze kaj tranokti aŭ en malmultekosta hotelo aŭ loka tendumejo por ke ni havu pli da tempo por esplori la urbon. Se vi ŝatus ĉeesti, bonvolu kontakti nin en la JEB-forumoj por pli da informoj. La sekva renkontiĝo okazos aŭtune, verŝajne en Londono.

La semajnfino post la Brita Kongreso tri JEBanoj vojaĝis al Halifaxo en norda Anglio, kie du eksterlandaj esperantistoj gastis ĉe Rolf kaj Petra Fantom. Sabaton vespere ni ludis la kartoludon Uno laŭ tre komplikaj internaciaj reguloj, dum dimanĉon ni iris al Malham Cove en la Jorkŝiraj Valoj kaj montris al la vizitantoj la belecon de la angla kamparo.

Du semajnojn poste Tim kaj Clare denove vojaĝis norden, kaj

kune kun Rolf ĉeestis la printempan kunvenon de la Nordokcidenta Esperanto-federacio en Preston. Clare estis la gastparolanto kaj prelegis pri la temo 'Esperanto kaj mi, spertoj kaj esperoj'. La sperto estis iomete timiga, sed feliĉe ŝi travivis kaj dankas al ĉiuj, kiuj ŝin invitis.

La JEBanoj ĉiuj tre ĝuis la renkontiĝon kaj ni aparte ĝojis ekkoni la plej junan membron de JEB, Michael, kiu malgraŭ siaj 14 jaroj jam lernas pli da lingvoj ol la cetero de JEB kune!

Jen la plej gravaj novaĵoj el la junulara movado. Pli da informoj ĉiam troviĝas ĉe nia retpaĝaro <http://www.jeb.org.uk>. □



Daŭrigo el paĝo 15

“Unika Esperanta mondsolidar-eco pruvu, ke Esperanto vivas.”

Li konstruisto bezonas ŝtonetojn el la tuta mondo por fari belan kruston kun Esperanto-solidarecĝonoj el la tuta mondo. La afero nun urĝas. Sendu al: s-ro Petro Zilvar, Interkultura Centro Herzberg, D-37412 Herzberg/Harz, Grubenhagenstr. 6. Retpaĝaro: <http://ic-herzberg.de>.

• **Eŭrokanzone ne tutsole usone**
Per artikolo titolita “Kanzon-teksto de Patricia Kaas tradukita en Esperanton <www.liberafolio.org/Members/fsoghomonian/kanzonteksto-de-patricia-kaas-tradukita-en-esperanton>”, Francis Soghomonian atentigis en *Libera Folio*, ke la oficiala retejo de la franca kantistino enhavas tridek naŭ tradukojn de la kanzono, kiu reprezentis Francion en la pasinta Eŭrovida Kanzonkonkurso en Moskvo. Esperanto estas unu el la multaj lingvoj kun kompleta teksto <www.patriciaakaas.net/eurovision2009> (alklaku ‘Les Paroles’).

La produktteamo de la fama franca kantistino Patricia Kaas decidis, ke ties teksto estos tradukita ne nur en la anglan, sed en kiel eble plej multajn lingvojn de la aliaj partoprenlandoj. Salutinda estas la elekto ankaŭ de Esperanto, kvankam ĝi estas oficiala lingvo de neniu lando.

Dennis Keefe verkis artikolon sub la titolo “Patricia Kaas povas helpi popularigi Esperanton <www.liberafolio.org/2009/kaaskanto/>”, por inviti al subteno de tiu iniciato kaj proponi strategion kaj bonajn ideojn.

• **East Anglian Daily Times**

On 18 April an interview with Roy Threadgold, covering more than two pages, appeared in *The East Anglian Daily Times*. Colour pictures of Roy with his animals on the farm included a photo of the ‘Esperanto-ponto’ – built by the Eastern Esperanto Federation

a few years ago – looking in pristine condition. The tone of the article was sympathetic to both farm and Esperanto life. The journalist found out about Esperanto via the BBC’s website, where mention of the ‘Littlewoods advert’ aroused his curiosity. Well done, Roy!

• **Radio Cumbria**

Stephen Thompson briefly starred on Radio Cumbria on the morning of 11 May. The online link is: http://www.bbc.co.uk/iplayer/episode/p00308km/Breakfast_with_Gordon_Swindlehurst_11_05_2009/. Scroll to 1 hour 22 minutes into the programme.

• **Euronews estas gvatinda**

La oficiala EU-retejo www.euronews.net ne malofte okazigas voĉdonojn pri aferoj kiel komuna lingvo por Eŭropo, do valoras atenti ĝin.

• **European language policy**

The Autumn/Winter 2008 issue of the European Language Gazette contains news from the European Centre for Modern Languages (ECML) of the Council of Europe, the Language Policy Division and other relevant sectors of the Council of Europe covering the period August–December 2008. It is online at: <http://www.ecml.at/news/newsletter>.

• **Unuafoje en Mongolio**

La 6-a Azia Kongreso de Esperanto okazos en Ulanbatoro, ĉefurbo de Mongolio, de la 19-a ĝis la 23-a de junio 2010. Oni povas informiĝi pri la kongreso kaj rete aliĝi en la retejo www.mongolio.info. Retadreso de LKK estas mn_esperanto@yahoo.com kaj ak2010@esperanto.mn.

• **Pordeto al Esperantaj retejoj**

Laŭdire la sekva retadreso estas ‘pordeto al kelkaj Esperantaj retejoj, ĝisdatigita ĉiumonate’: www.esperanto-tra-la-mondo.net.

New members of EAB

Michael Heary, Manchester
D.T. Hopper, Folkestone
D. Kennard, Somerset
Olga Kerziouk, London
M. Morris, St Albans
Tim Owen, Leicestershire
Ann Richards, Bournemouth

Deceased Members

Valerie Boger, Crawley
Brendan Marron, Belfast

Completed the Free Postal Course

Roger W. Moore, Chester
Marion Whistle, London

Completed the Elementary Course

Lorna Davies, Malvern

Elementary Exam Success

Raymond Butler, Croydon (with Distinction)
Lorna Davies, Malvern (with Distinction)

• **Ĉu kanadaj desegnofilmoj?**

Volas fari animaciajn filmojn en Esperanto Simmon Keith Barney el Kanado. Tiucele li studas la arton ĉe filma lernejo. Ĝuste nun li volas montri al siaj samklasanoj – kaj instruistoj – ke ja ekzistas homoj tutmonde, kiuj volas vidi novajn animaciojn en Esperanto. Se vi subtenas lian revon, bonvolu sendi poŝtkarton al li ĉe la jena adreso: Simmon Keith Barney, 1111 Pacific St., #407, Vancouver, BC V6E 3X7.

• **Salutu la Savarmeon!**

To celebrate its 125th anniversary, Lowestoft Salvation Army Citadel have produced a bilingual blog (Esperanto/English). The members would love to receive greetings and comments from members of EAB at www.lowestoftcitadel125.blogspot.com.

• **Retrevuo scienca**

Teleskopo estas scienca revuo rete aperanta en Brazilo por publikigi internacilingve artikolojn pri diversaj sciencaj fakoj: www.teleskopo.com. □



Internacia kresprofesto en suda Londono: La 28-an de februaro, por festi la Internacian Semajnon de Amikeco, la Sud-Londona Esperanto-Grupo organizis 'Krespo-Feston' ĉe la domo de Greta Buttinger (vidu la foton supre). Ĉeestis entute 27 esperantistoj, interesitoj kaj gastoj, el Anglio, Skotlando, Nederlando, Irako, Finnlando, Greklando, Maŭricio, Italio, Hindio, Koreio kaj Tajvano, do estis tre internacia kunveno. Ni multe manĝis, trinkis kaj babilis, kaj Esperante kaj angle. Ĉiuj aparte ĝuis la bongustajn internaciajn krespojn, preparitajn de Annice Szrajzman, kaj pasigis amikecan kaj bonhumoran posttagmezon.



Kunsido en Prestono rompis la rekordon! La 9-an de majo 27 homoj partoprenis en la pasinta kunsido de Nord-Okcidenta Esperanto-Federacio en Prestono (la plej alta nombro da homoj, kiuj ĉeestis Federacian kunsidon en tiu urbo), kie Clare Hunter bone paroladis pri siaj spertoj kaj esperoj Esperantaj. Detaloj pri la evento aperis en la loka ĵurnalo Southport Champion kaj en BBC Radio Cumbria. En la foto de la kunveno (supre) aperas, de maldekstre, Malcolm Jones, Paul Gubbins, Clare Hunter, Tim Owen kaj Stephen Thompson.

Venu al 'Kultura Tago' en Suda Londono

Sabaton, la 25-an de julio, okazos 'Kultura Tago', ekde 13h00 ĝis proksimume 19h00, ĉe Unity Centre of South London, 2-4 Ravenstone Street, Balham, London, SW12 9SS. Estos manĝaĵoj (speciale afrikaj kaj karibaj, sed ankaŭ aliaj), trinkaĵoj, distraĵoj, kulturo, kaj kompreneble kunularo kaj amuzo! La Sud-Londona Esperanto-Grupo ankaŭ prezentos ekspozicion kun informoj por interesigantoj. Venu kaj montru, ke Esperanto estas vivanta lingvo! Alportu viajn geamikojn! Ĉiuj estos bonvenaj! Pli da informoj haveblas de Gregory Porilo, rete: esperanto-sleg@tiscali.co.uk.

Jorkŝiraj invitoj

La jorkŝira federacio kore invitas vin al la ĉiujara seminario en York je sabato, la 27-a de junio 2009. Gvidos la seminario Andrew Weir, nova lumulo de la skota asocio. Aligilo, stratmapo kaj pli da informoj haveblas de la kasisto, Audrey Duerden, 1 Grove House Drive, Bradford BD2 4DS.

La aŭtuna kunveno de la jorkŝira federacio okazos en Sowerby, apud Thirsk, je sabato, la 5-a de septembro 2009. Ni bonvenigas ĉiujn al la sola federacia kunveno en Anglio, kies lunĉbufedo liveriĝas per biciklo! Pli da informoj haveblas de la prezidanto, Jack Warren, 11 Linden Grove, Linthorpe, Middlesbrough TS5 5NF; tel. 01642 82 76 79; rete: pwarren47@hotmail.co.uk.



La 26-a Internacia Festivalo invitas al Nördlingen

**27 dec.–
3/4 jan.**

La ĉi-jara gastejo kaj (dekstre) pasintjara silvestra amuziĝo post noktomezo



Fotos: Hans Floreal Gabalda

La bavara mezepoka urbeto Nördlingen bonvenigas vin! Komforta domo kaj simpatiaj mastroj garantias sukcesan kaj etosplenan restadon. La urbo kun sia komplete konservita urba murego kaj la bele restaŭrita centro invitas al promenoj kaj senstreĉiĝo. Nia kleriga programo estas konata pro la abundaj kaj altkvalitaj ofertoj (vidu raportojn en nia IF-retpaĝaro www.internacia-festivalo.de)

Liba kaj Floreal Gabalda (Francio) jam vizitis Nördlingen kaj skribis:

“Tre bela loko, luksaj, grandaj kaj komfortaj ĉambroj, ... Nördlingen estas vere rava kaj pitoreska urbeto, certe multaj aprezos la elekton!”

Festu jarfine kun ni! Hans-Dieter Platz, IF-organizanto, rete: HDP@internacia-festivalo.de



Nova glumarko feste por la 150-jara datreveno de la naskiĝo de Zamenhof

New sticker celebrating the 150th anniversary of the birth of Zamenhof

- £1.80 per sheet of 20 + 30p. postage for one or two sheets, or 50p. postage for three or more sheets. Order from EAB, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE.



NEW


Esperanto Mini-Course

Barlaston: EAB, 2009.

32 pages, 15cm, paperback.

This is a 10-lesson course based on the popular *Esperanto for Beginners* by Montagu Butler (in English). An ideal gift as a ‘first taster’.

- Order from EAB for £1.20 + p. & p.



NEW PRICE

English–Esperanto–English Mini-Dictionary or Mini-D

by Edmund Grimley Evans

Barlaston: EAB, 2003.

64 pages, 15cm, paperback.

A pocket two-way dictionary with a basic core vocabulary (3,000 words) plus a grammar summary.

- Order from EAB for £1.80 + p. & p.

SPECIAL OFFER!

Package of both *Esperanto Mini-Course* plus *Mini-D* for just £3.00 postage paid.